

Rio  
Esperantista



ASOCIO ESPERANTISTA  
DE RIO-DE-JANEIRO

Decembro 2013 – Januaro 2014

*Kultura Revueto*

*de*

**AERJ**



Câmara Municipal – Rio-de-Janeiro

# OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-JANEIRO

Decembro 2013 – Janeiro 2014

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO

★ Rua Teófilo Otoni, 135 / 302 ★

☎ 2467-4296 – ✉ aerjrj@hotmail.com e [www.aerj.org.br](http://www.aerj.org.br)

Redaktas: *Paula Sergio Viana*

Arangas: *Alfredo Braga*

---

## RIO ESPERANTISTA

### VORTOJ DE LA REDAKTORO

Lingvo havas sencon nur se komunumo aktive uzas ĝin kaj per ĝi esprimas siajn pensojn, sentojn, dezirojn – unuvorte, sian kulturon. Lingvo kaj kulturo estas ĝemeloj. Komprenoble, ĉi tiuj veraĵoj validas ankaŭ por Esperanto. Se oni volas, ke Esperanto plu vivu kaj kresku kiel kulturfenomeno, tiam oni devas aktive uzi ĝin. Tiel gajnos la lingvo kaj la uzanto.

Lastatempe, amaso da eblecoj por aktiva uzado de Esperanto estas disponebla, precipe danke al interreto. Neniu rajtas diri, ke li ne havas oportunajn okazojn por tio. Se menciĝas nur du tiajn bonajn novaĵojn: unu venas el nia AERJ, alia el EASP, du el la plej fortaj ŝtataj Esperanto-asocioj en Brazilo.

El Rio ĵus aperis la TV-aerj, kiu promesas aperigi filmitajn prelegojn. Du el ili jam eldoniĝis, kun riĉaj enhavoj. El San-Paŭlo eldoniĝis lastatempe du belaj libroj, kiuj enhavas rakontojn de la konata portugala verkisto Eça de Queirós. La tekstoj

estas dulingvaj, kio aldonas belan didaktikan valoron al la eldonoj. La tradukinto, la kompetenta José Dias Pinto, estas garantio pri altnivela traduko. Facile mendeblaj estas la libroj, per la retejo de AERJ. Ni ne forgesu, ke malgraŭ la granda utileco de interreto por la disvastigo kaj praktikado de Esperanto, tamen libroj ankoraŭ estas altvaloraj kulturrimedoj, kaj la Esperantista publiko havas moralan devon plifortigi la libromerkaton. Dume, cetere, niaj diligentaj samideanoj el San-Paŭlo anoncas sian intencan baldaŭ lanĉi servon de filmetoj, nome iaspecan interretan televidon.

Fine, alproksimiĝas la Brazilia Kongreso de Esperanto, en la suda urbo Forianópolis. Certe ĝi devas esti nia plej grava evento de la jaro. La organizantoj klopodas, ke ĝi ja estu vera sukceso. Sed plej grava estas, ke ni amase partoprenu! Ni montru, ke Esperanto estas vivanta lingvo!

— P.S.V.

---

## VORTOJ DE LA ESTRARO

Kara leganto, denove ni ĝojas pro la alsendo de plia bulteno *Rio Esperantista*, ĉifoje la lasta en la jaro 2013, dum kiu bonŝance ni regule alsendis niajn informilojn.

Ĉi-numere, indas informi ke finfine nia Statuto estas aprobita kaj agnoskita de la Civila Registrejo. Tio gravegas ĉar nun, kun Statuto kiu bone enkadriĝas en la kuranta Civila Kodo, la Aso-cio povas pli bone, laŭ juraj rimedoj, starigi projektojn kaj peti subvenciojn. Ankaŭ indas informi pri niaj aktualaj agoj:

1. La kurso pri Metodologio de Esperanto, gvidita de la profesoro Fernando Pita sukcese okazis kaj laŭ la plano la projekto daŭros en 2014;
2. Ni kreas nun rete alireblan katalogon de la ĉefaj eventoj kaj aktivaĵoj okazigitaj en Rio-de-Janeiro;
3. Niaj libroservo kaj bibliotekoj estas en reformad-procezo;
4. Ni ekorganizigas por esti sidejo de la 50-a Brazila Kongreso de Esperanto, realigota en 2015, kaj ankaŭ por lanĉi disvastigan projekton ankoraŭ ĉi januare.



## ARTIKOLO



Rogerio Ferreira

### VASTAJ EMOCIOJ KAJ NEPERFEKTAJ PENSOJ

En 1990, tiam en la aĝo de 15 jaroj, mi la unuan fojon legis *Feliz ano novo*, libro kiu konatigis min kun la verkisto kiun, jarojn poste, mi havis la privilegion traduki al Esperanto. Post tiu unua kontakto sekvis pluaj legaĵoj de la sama aŭtoro: *O cobrador*, *A coleira do cão*, *O buraco na parede*. Plej impresis min la brutaleco, la seka stilo de la verkisto, tiel malsama ol tiuj, kiujn mi estis devigata legi en la lernejo. Rubem Fonseca naskiĝis en Juiz de Fora, Minas Gerais, sed loĝas en Rio ekde kiam li estis okjara. Rubem Fonseca estas konsiderata unu el la plej

gravaj brazilaj verkistoj ankoraŭ vivaj kaj estas tre studata eksterlande. En 2003 li gajnis la premiojn *Juan Rulfo* kaj *Camões*, la plej grava de la portugala lingvo.

Krom libroj de rakontoj, Rubem Fonseca verkis ankaŭ romanojn, kaj la romano al kiu mi elektis doni verdajn vestojn estas *Vastaj emocioj kaj neperfektaĵoj*, unuafoje publikigita en 1988. Ĝia ĉefa intigo rakontas pri kinreĝisoro, kiu implikiĝas en aventuro pri murdo kaj altvaloraĵaj ŝtonoj, samtempe kiam li provas verki scenaron por filmo. Por ĝia traduko mi po-vis kalkuli je la tre



zorga kontrol-legado de la itala kolego Carlo Minnaja. Tamen, eĉ post atenta tralego de la manuskripto fare de la reviziinto, de la eldonintoj kaj de mi mem, lastminute ŝanĝita frazordo provokis la foreston de akuzativo en iu loko tuj en la komencaj paĝoj, sed neniu ĝis nun ŝajne rimarkis tion aŭ ne volis atentiĝi pri tiu manko.

*Vastaj emocioj kaj neperfektaj pensoj* estas atentokapta romano, kiu ekde sia unua ĉapitro katenas nin sur la fotelo pro sia spirraba historio. Esperantigante ĝin, mi havis la oportunon eksperimenti lecionojn

kiujn mi lernis legante esperantajn tradukmajstrojn, ĉefe Fernando de Diego kaj Reinhard Haupenthal, kies avangardismon mi rigardas tre pozitiva por la esperanta literaturo, kaj eble ĝuste tial la fina rezulto de mia laboro povas ne tre plaĉi al kelkaj, precipe al tiuj misinfluitaj de la falsa koncepto, ke Esperanto devas resti lingvo simpla ankaŭ sur la literatura kampo. Kiel ajn, mi invitas vin malkovri la perfortan mondon de Rubem Fonseca, ĉu en Esperanto, ĉu en la portugala lingvo.



Carlos Correa

## INSTRUI ESPERANTON POSTULAS SINPREPARON, NE NUR VOLON

En niaj jaroj de lernado, disvastigado kaj vivado ene de esperantismo, ofte ni vidas plurajn personojn, ĉu pro la facileco de la lingvo aŭ ne, kiuj volas instrui la lingvon al aliaj personoj sed vere, ili ne havas sufiĉan fluecon, konon aŭ didaktikon por instrui nian lingvon.

Kontraŭe al aliaj etnaj aŭ "naturaj" lingvoj, tio estas, lingvoj, kiuj apartenas al ia homgrupo, regiono aŭ lando, esperantistoj ne naskiĝas kiel esperanto-parolantoj. Krom tio, la kvanto da esperantistoj nur kreskas laŭ la decido de interesuloj lerni kaj praktiki la lingvon, ne alimaniere.

Aliflanke, eĉ ni ne distingas niajn parolantojn kiel naturajn, ni faras tion per la uzo de la adjektivo denaska, tio estas iu, kiu parolas esperanton ekde sia naskiĝo.

En tia okazo, laŭ la determino de la propra nomo, estas necese, ke la infano parolu Esperanton konstante kaj por fari tion, ĝiaj gefamilianoj devas esti veraj parolantoj de la lingvo, laŭ la plena signifo de la vorto.

Por ĉiuj aliaj, kiuj ne parolas Esperanton, estas necesaj multaj horoj da sindediĉo, legado kaj lernado por gajni la plenan nivelon, kom-

pare kun la C2 de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

Kaj, por ke tiu lernado okazu, bonajn instruistojn oni bezonas, ne nur koncerne la lingvon, sed ankaŭ pri lernmetodoj, kaj la utiligo de ĉiuj helpiloj, kiuj estos disponeblaj, inkluzive de la novaj teknologioj kiel Skajpo, Fejsbukoj, ktp.

Bonaj instruistoj estas tiuj, kiuj ekvilibras ĉiujn tiujn premisojn kaj samtempe konservas la fajran volon de la gelernantoj por ekkoni novajn aferojn.

La usona verkisto Nicholas Sparks, en sia libro "Dear John" (Kara John), publikigita en 2007 asertas: "bonaj instruistoj estas estimindaj. Ili inspiras kaj ludigas nin, kaj vi lernas multajn aĵojn eĉ nerimarkante tion".

Pro tio, karaj amikoj, antaŭ ol akcepti la lernadon de la lingvo, vi devas prepari vin kaj scii kiel lernigi ĝin. Por ke niaj gelernantoj estu kapablaj ne nur komunikiĝi en Esperanto, sed por ke ili povu ja travivi ĝin.



Paulo Sérgio Viana

## SPEKTINDA FILMO DE WOODY ALLEN

La lasta filmo de la usona kinreĝisoro Woody Allen lanĉiĝis en Brazilo antaŭ kelkaj semajnoj. En la tuta mondo, nova filmo de tiu famulo estas atentokapta kaj ekscita evento. Temas ja pri talentulo, kiu preskaŭ ĉiujare lanĉas novaĵojn – jam de jardekoj. Li estas multe pli konata pro siaj komedioj, sed mi persone preferas liajn seriozajn filmojn. (Estas vero, ke lia ridigaĵoj, kiel tiuj de ĉiu talenta komediisto, staras ĉiam sur fundamento de tragiko de la homa spirito.)

Ĉi-foje li prezentis la gemon *Blue Jasmine* (Blua Jasmeno). Mi legis recenzojn de iuj kritikemaj fakuloj, kiuj plendis pri la malaltigo de la ar-

ta nivelo, se oni komparas ĉi tiun filmon kun liaj antaŭaj "Noktomezo en Parizo" kaj *Match point*. Mi ne konsentas. Woody Allen miaopinie restis je la sama nivelo. Per *Blue Jasmine* li eĉ aŭdacis fari akran kritikon kontraŭ la tiel nomata sovaĝa kapitalismo. Anstataŭ loki la scenojn en grandajn urbojn de Eŭropo, kiel li faris lastatempe, li metis sian historion inter Novjorko kaj San-Francisko, kvazaŭ por diri, ke la tuta Usono estas sub la danĝero de korupto, diigo de mono kaj frivoleco.

La rakonto montras du fratinojn. Unu estas eksedzino de milionulo, kiu konstruis sian imperion per mal-



honestaj manovroj, kiuj malprofitigis neriĉulojn. Li mortis, kaj la edzino estas nun malriĉa, kaj suferegas pro perdo de lukso kaj fiero. Ŝia fratino estas proleto, kies edzo perdis sian tutan ŝanĉon plibonigi la vivon pro tio, ke li donis sian monon al la malhonestaj milionulo. Unu fratino fundamentas sian vivon sur monon, la alia sur simplan vivon sen vastaj horizontoj. Sed estas malfacile trovi feliĉon, en socio, kie dolaro estas

la granda kompasoj. Fine, Allen klare elektas la proletan fratinon.

La tuta filmo klare aludas al lastatempaj skandalaj okazaĵoj en Usono, kiam spekulacioj permesitaj de la financa sistemo bankrotigis multajn homojn. Sed la filmo ne estas propre politika, prozelitema. Ĝi montras nur, kiel malfortika estas la homa spirito, kaj kiom da respondecas havas ĉiu civitano en la konstruado de sana socia vivo.

Vidinda filmo!

---

## EL NIAJ KLASIKULOJ



José Dias Pinto

---

El la rakonto “José Matias”, de la portugala verkisto Eça de Queirós, tradukita de José Dias Pinto kaj eldonita de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo:

*“Linda tarde, meu amigo!... Estou esperando o enterro do José Matias – do José Matias de Albuquerque, sobrinho do Visconde de Garmilde... O meu amigo certamente o conheceu – um rapaz airoso, louro como uma espiga, com um bigode crespo de paladino sobre uma boca indecisa de contemplativo, destro cava-leiro, duma elegância sóbria e fina. E espírito curioso, muito afeiçoado às ideias gerais, tão penetrante que compreendeu a minha Defesa da Filosofia Hegeliana! Esta imagem de José Matias data de 1865: porque a derradeira vez que o encontrei, numa tarde agreste de Janeiro, metido num portal da Rua de S. Bento, tiritava dentro duma quinzena cor de mel, roída nos cotovelos, e cheirava abominavelmente a aguardente.”*

“Bela posttagmezo, mia amiko!... Mi atendas la enterigon de José Matias – de José Matias de Albuquerque, nevo de la vicgrafo de Garmilde... Vi certe konis lin – knabo bonaspekta, blonda kiel spiko, kun paladinaj krispaj lipharoj super ambigua buŝo de kontemplulo, lerta rajdisto, sobre kaj rafinite eleganta. Kaj scivolema spirito, granda ŝatanto de ĝeneralaj ideoj, tiel sagaca ke li komprenis mian *Defendon de la hegelana filozofio!* Ĉi tiu bildo de José Matias estas de 1865. Kiam mi lastfoje renkontis lin, en kruda posttagmezo de januaro, metita en portalo de Strato São Bento, li tremis en mielkolora palto, erodita ĉe la kubutoj kaj odoraĉis je brando.”

---

Komparu, ĝuu, kaj lernu (...kaj aĉetu la libron!)

## MORTIS NELSON MANDELA – SED PLU LUMAS LIA TORĈO

En decembro 2013 la mondo perdis lumegantan torĉon. Post longa malsano, forpasis la granda Nelson Mandela, en la sino de sia familio. La tuta homaro emociĝis. Ĉiuj ĵurnaloj kaj revuoj ĉie omaĝis lin kaj ripetis raportojn pri lia eksterordinara kaniero – de tribestro al monde rekonata kaj ekzemplodona ŝtatestro. Kiel Esperantistoj, ni havas pli fortan motivon por admiri kaj omaĝi la heroon. Lia vivo estis konstante batalado kontraŭ diskriminacio, kaj tiu temo estas al ni tre proksima.

Ni ne ripetu en nia modesta bulteno lian jam plene konatan vivhistorion. Ne necesas. La homoj ne forgesos lian pacemon, lian dolĉan toleremon kaj lian neskueblan fidon al homa fido kaj libereco, sen perforto. Ni preferas listigi kelkajn el la pensoj, kiuj faris lin grava personeco en la historio. Ni longe meditu pri ili.

“Kuraĝo ne estas foresto de timo, sed superado de timo.”

“Homo, kiu malliberigas alian homon, estas kaptito de malamo, li estas enfermita post la baro de antaŭjuĝo kaj maltoleremo. Same la premato kiel la premanto havas sian homecon forŝtelita.”

“Se vi deziras pacon kun via malami-ko, vi devas labori kun li. Tiam li fariĝos via kunulo.”

“Tempo por flegi vundojn alvenis. Al-venis tempo por starigi pontojn super a-bismoj, kiuj nin disigis. Jam ĉeestas tempo por konstrui.”

“Bona kapo kaj bona koro estas ĉiam bonega kombinaĵo.”

“Edukado estas la plej potenca armilo uzebla por ŝanĝi la mondon.”

“Popolgvidanto estas kvazaŭ paŝtisto. Li restas post la brutaro kaj lasas, ke la plej lertaj iru antaŭe, kaj ke la ceteraj sek-vu ĝin, tiel ke ili ne perceptas, ke deko-mence, ilin ĉiujn oni gvidas de malan-taŭe.”

“Plej granda virto en la vivo estas ne en tio, ke homo neniam falas, sed en tio, ke li restariĝas post ĉiu falo.”

“Demokratio baziĝas sur la principo de la plimultaj. Samtempe, demokratio postulas ankaŭ, ke oni protektu rajtojn de malplimultoj.”

“Nenio estas pli bona ol reveni al lo-ko, kiu restas sensanĝa, por malkovri, ki-om multe vi mem ŝanĝiĝis.”

“Atinginte la pinton de alta montaro, ni malkovras nur, ke ekzistas multaj aliaj, kiujn oni devas surgrimpi.”

“Ne ekzistas potenco sur la Tero ka-pabla kontraŭbari subpremitan popolon, kiu decidis havigi al si sian liberecon.”

“Jen mi staras ĉi tie, antaŭ vi, ne kiel ia profeto, sed kiel modesta servanto de vi mem, la popolo.”

## IOM DA POEZIO NECESAS...

### Kristnasko

Geraldo Mattos

*La festo de Kristnasko fine venas  
kun siaj sorĉe lumaj bondeziroj  
kaj la pastrar' en laŭta panegiroj  
la enkarniĝon de Jesu' solenas...*

*Okulojn de infano fikse tenas  
ludplenaj magazenoj kaj foiroj,  
en kiuj nekristanaj dikaj viroj  
la daton pro la vendebleco benas...*

*Dum katedralaj mesoj gradiozas,  
mizeraj sur la stratoj peralmozas  
malĝojan tagon kiel la ceteraj...*

*La Kristo de la stal' amare plendas,  
ĉar lia naskevento sin prezentas  
okazoj por negocoj pli prosperaj.*

---

### AMA KRISTNASKO

Adeste Fideles – versio de: Sylla Chaves

“Naskiĝis Jesuo!” – diras la ĉielo  
Per voĉo de anĝelo  
Sendita de Di’.  
Portis Jesuo al ĉi tiu tero de  
de krimo kaj kolerio,  
milito kaj sufero,  
la lumon de espero...  
savon por ni.

Li savon alportis al la tuta mondo,  
kaj sunos la estonto  
se ni sekvos Lin.  
Diris Jesuo, ke ni devas ami.  
Nur amo estaas grava,  
nur amo estas prava,  
nur amo estas sava...  
Ĝi savos nin!

**TAMEN, MEMORU!  
SEN VIA ALIĜO, SEN VIA AKTIVA PARTOPRENO,  
AERĴ NENION POVAS FARI!**

**ĈU VI JAM ALIĜIS AL AERĴ POR 2014?  
FELIĈAN NOVJARON!**